Gustav Falke,

# La timemuloj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Printempe, kiam blovis vent',
demandis ili kun timsent':
Ĉu estos la vetero
agrabla de l' somero?

Kaj kiam staris en ornam'
de spikoj la grenkampoj jam,
suspiris ili kune:
Ĉu ventos enaŭtune?

Foliojn ŝiris vento for,
plendadis ili pro dolor':
Ja venos nun post tio
la vintro, frostos ĉio.

Malprvaj estis ili ne,
la vintro venis ankaŭ tre
rapide al ĉi tiuj
mizeraj homoj, kiuj

nun sidas post la fornoj kaj
atendas, ĝis la nova Maj'
verdigos ree ĉion.
Pro kio timi ion?

*Traduko de la Germana poemo "Die Sorglichen" de* Gustav Falke *(∗1853-01.11 – †1916-02-08) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1997-02.*

*MR-296-1 / Arg-779-1561 (2013-01-19 11:12:46)*

Gustav Falke,

# Die Sorglichen

Im Frühling, als der Märzwind ging
und jeder Zweig voll Knospen hing,
da fragten sie mi Zagen:
Was wird der Sommer sagen?

Und als des Korn in Fülle stand,
in lauter Sonne briet das Land,
da seufzten sie und schwiegen:
Bald wird der Herbstwind fliegen.

Der Herbstwind blies die Bäume an
Und ließ auch nicht ein Blatt daran.
Sie sahn sich an: Dahinter
kommt nun der böse Winter.

Das war nicht eben falsch gedacht,
der Winter kam auch über Nacht.
Die armen, armen Leute,
was sorgen sie nur heute?

Sie sitzen hinterm Ofen still
und warten, ob's nicht tauen will,
und bangen sich und sorgen,
um morgen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Gustav Falke *(∗1853-01.11 – †1916-02-08).*

*Arg-779-1560 (2013-01-19 11:11:16)*

*Pri la poeto vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Gustav_Falke`.